



Forumo pri Minoritatoj, 3a sesio
14a kaj 15a de decembro 2010, Palaco de Nacioj, Ĝenevo

Alparolo de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Sinjorino Prezidantino, Gesinjoroj,

Mi parolas nome de Universala Esperanto-Asocio, kies membroj, la parolantoj de la internacia lingvo Esperanto troviĝas en pli ol 120 landoj.

En la projekto de rekomendoj traktata hodiaŭ, specife en la ĉapitro 32, plurloke aperas la mencio pri bezono de tradukado. Fakte, por povi esti aktiva en la ekonomia vivo, oni devas povi kompreni la leĝojn kaj la dokumentojn rilatajn al tiu medio en sia propra lingvo.

Hodiaŭ ni deziras altiri vian atenton je la klopodoj de Eŭropa Unio pri malrespekto de la egaleco de ĉiuj lingvoj de la membro-ŝtatoj, malgraŭ tio ke tiu egaleco estas solene deklarita en ĉiu fundamenta dokumento de EU. Koncerne patentojn, temas pri klopodo malebligi la utiligon de aliaj lingvoj ol la germana, la angla kaj la franca dum la depono, ekzameno kaj publikado de patentoj. Tiu maniero procedi kreus maljustan avantaĝon por firmaoj kaj civitanoj de landoj, kie tiuj ĉi lingvoj estas uzataj.

La utiligo de nur tri lingvoj koncerne patentojn en Eŭropa Unio, kie estas 23 oficialaj lingvoj, kaŭzus malavantaĝojn maljustajn al firmaoj kaj civitanoj en landoj, kie tiuj ĉi lingvoj ne estas oficialaj, kaj tia decido estus sendube kontraŭa al la principo de reala partopreno de ĉiuj en la ekonomia vivo. Tia decido malvalorigus lingvojn, kiuj hodiaŭ ankoraŭ estas prestiĝaj, kaj donus avantaĝon al kelkaj privilegiataj lingvoj. Estas evidente, ke lingvoj kiel ekzemple la itala aŭ la pola, kies utiligo estus ekskludita de la administra proceduro, kaj en kiuj oni ne plu uzus aŭ kreus vortojn rilataj al teknikaj malkovroj kaj uzadoj, estus destinataj al dialektiĝo kaj la parolantoj de tiuj lingvoj iĝus duarangaj civitanoj.

Ni protestas forte kontraŭ tiuj klopodoj malaperigi la lingvajn rajtojn de granda nombro de la civitanoj de Eŭropa Unio, kaj kontraŭ la malracia rifuzo pri ekplanado de la uzo de neŭtrala lingvo por la interkomunikado, kiel ekzemple la latina, aŭ pli bone : la internacia lingvo Esperanto. Tiu ilo de interetna komunikado, kies uzo permesas respekti ĉiujn lingvaj kaj kulturajn minoritatojn, estas tre vivanta hodiaŭ. Pri tio atestas multaj libroj, konferencoj kaj eventoj pri sciencaj kaj teknikaj temoj, diplomlaboraĵoj, kaj la ekzisto de sciencaj, fakaj asocioj utiligantaj Esperanton.

Dankon pro via atento.

www.uea.org | www.lingvaj-raitoj.org | www.esperanto.net | www.lernu.net